

# BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



4

SOFIA — APRILO 1961

## E N H A V O

	Paĝo
* * * — V. I. Lenin	1
BELETRO KAJ POEZIO	
V. Majakovskij — Lenin	4
Hristo Gorov-Hrma — Lenin . . .	4
K. Matusovskij — Vi flugu, kolomboj . .	5
St. Mihajlovski — Popolo renaskita, marŝu	5
Anna Haava — Mi povas	5
* * * — Eplgramoj	5
HEROA PASINTECO	
* * * — Fratoj Novanski	6
I. S. — Stiliĵan Peŝev	6
Paul Cillga — Pri la malsamideanoj el SAT	8
ORGANIZA VIVO	
RIDO SANIGAS	
JUNULARO SUR POŝTENO	
D. Ĉolakova — Junulara balo kaj konferenco en Plovdiv	14
NI RECENZAS	
I. S. — Lernolibro de Esperanto	15

*Abonkotizo: jara — 14 levoj, duonjara — 7 lv. Por eksterlando — 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro.*

*Reklamtarifo: 5 levoj por cm<sup>2</sup>; korespondanoncoj: 0.5 levoj por ĉiu vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 1000 v.*

### LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

<b>ALBANIO:</b> Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.	<b>NEDERLANDO:</b> Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.
<b>ITALIO:</b> Julia Franceschi, vja A. Boito 6, Padova	<b>RUMANIO:</b> Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5
<b>KOREO:</b> Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.	<b>SOVETUNIO:</b> J. Kudrjavickij, PK 1255, Moskva K-9.
	<b>SVEDIO:</b> Karl Kvist, Deje, Box 109—a.

**Frontpaĝa bildo: „Aŭtunaj fruktoj“ — pentraĵo de Iv. Gongalov**



## V. I. LENIN

*La popoloj de Sovet-Unio, la popoloj de la socialismaj landoj, la klasbatala laboristaro de la kapitalismaj, koloniaj kaj duonkoloniaj landoj — la tuta progresema homaro — solene celebras la 91-jaran datrevenon de la naskiĝo de Vladimir Iliĉ Lenin.*

*La leninismo estas standardo de milionoj da homoj, kiuj formas la potencan armeon de la batalantoj por paco kaj socialismo en la tuta mondo. La grandega partio de Lenin efektivigis la venkon de la proleta revolucio, kreis la unuan en la mondo socialisman ŝtaton, malkovris novan eraon en la homa historio.*

*La Granda Oktobra Socialisma Revolucio plirapidigis la disrompon de la imperiisma sistemo. Post la Dua Mondmilito kaj precipe dum la lastaj kelkaj jaroj multaj novaj landoj en Eŭropo, Azio kaj Afriko eliris por ĉiam el tiu sistemo. Sovet-Unio, kiu liberigis la eŭropajn popolojn elsub la jugo de la faŝismo, hodiaŭ estas potenco apogilo de la popoloj kontraŭ la rabemaj planoj de la imperiistoj, por daŭra paca konekzistado de la ŝtatoj kun malsamaj politikaj kaj sociaj sistemoj.*

*La sovetaj popoloj kaj la popoloj de la ceteraj socialismaj landoj suldas siajn historiajn venkojn, antaŭ ĉio, al la partio de Lenin kaj al la genia, senmorta instruo de Marks-Engels-Lenin. La nuna epoko eniros en la historion de la homaro kiel epoko*

*de batalo por triumfo de la grandegaj ideoj de leninismo.*

*La leninismo estas la plej grandega socia forto de nia epoko. La grandaj politikaj eventoj, la tuta marŝo de la socia evoluo ne nur ne refutis la leninisman, sed alportis novajn, milojn da pruvoj pri ĝia kapableco kaj forto. La vivo entute pruvis la geniajn prognozojn de Lenin pri la pereado de la monopolista kapitalismo kaj pri la konstruo de socialismo.*

*Ni ĉiuj estas atestantoj de la grandaj politikaj kaj ekonomiaj ŝanĝoj okazintaj en la mondo post la Dua Mondmilito. Tiu ŝanĝo havis interalie kiel sekvon la dividon de la mondo je du tute kontraŭaj tendaroj — la socialisma kaj la imperiisma. Formiĝis ankaŭ multaj neŭtralaj landoj, kiuj kune kun la socialismaj landoj batalas por la konservo de la tutmonda paco.*

*La socialisma tendaro defrunte kun Sovet-Unio efektivigas politikon, bazitan sur la principoj de Lenin por daŭra paca kunestado de la ŝtatoj kun malsamaj politikaj kaj sociaj sistemoj, por forigo de la milito kiel rimedo por solvo de la nesolvitaj problemoj inter la ŝtatoj kaj popoloj, por ĝenerala senarmigo.*

*Ĉe tiaj kondiĉoj ni, la bulgaraj esperantistoj, laboras laŭ niaj modestaj fortoj kaj ebloj kaj penas kontribui en la batalo por paco, kiun nun aspiras la popoloj de la tuta mondo.*

En la trezorejo de Lenin — verkaro ni ĉiam povas ĉerpi tre multon, kio esence rilatas ankaŭ al la progresema Esperanto-movado. En tiu trezorejo ni trovas ĉion necesan por difini la vojon de nia batalo.

Ni eluzas la internacian lingvon por internacia kunligo kaj internacia edukado de laboruloj, por starigo de senperaj internaciaj rilatoj. Ni praktikas la internacian lingvon kiel unu el la rimedoj, kiu ĉe certaj kondiĉoj povas esti pli praktika ilo por starigi veran egalecon inter la popoloj kiam ili interrilatosis sen neceso studi malfacilajn fremdajn lingvojn. Lenin diras en la kritikaj skizoj pri nacia problemo: „Nacia programo de laborista demokratio estas: neniam privilegioj al iu nacio aŭ lingvo.“ Ĉe la uzado de naciaj lingvoj en rilatoj inter diversaj nacioj la principo de egaleco ĉiam rompiĝas. Tiu tezo de Lenin certe donas rajton al la esperantistoj supozi, ke ankaŭ en plia evoluo de la movado por internacia lingvo ĝi nepre malhelpos ĝis certa grado de la hegemonio de unu lingvo al alia.

Ofte oni priridas la esperantistojn, ke iliaj penoj revoluce organizi la lingvon estas senesperaj kaj kontraŭnaturaj, ĉar la „scienco“ instruas, ke la lingvo evoluas spontane. Kaj ni certe supozus, ke apenaŭ Lenin akuzus la esperantistojn pro iliaj penoj anstataŭ spontana evoluo de la lingvo apliki al ĝi certajn metodojn de organizita influo, ĉar li estas fidela kaj konsekvenca marksano kaj Marks mem diras: „Memkompreneble estas, ke la homoj scipovos plene kontroli kaj tiun produkton de la homa gento — la lingvon, kiel produkto de la disvolviĝo de la homa socio“.

Ofte la kontraŭuloj de Esperanto kaj de la Esperanto-movado aludas, ke la esperantistoj okupiĝas per utopiaĵo, ke ili estas revuloj — idealistoj sen kontakto al reala vivo, ke la movado por Esperanto efektive estas nur elpenaĵo...

En la konata libro de Lenin „Kion fari“ troviĝas rezonoj pri revoj kaj revuloj. Por pravigi la rajton revi, Lenin uzas la jenan argumentadon de Pisarev: „Revo povas avangardi la naturan evoluon de okazintaĵoj aŭ ĝi povas flankiĝi tlen kien neniam iras la natura evoluo de cirkonstancoj. En unua kazo revoj neniel malutilas. Ili eĉ povas subteni kaj fortigi la energion de aganta persono, se revanta persono serioze kredas al sia revo, atentis la vivon, kontraŭstarigas siajn konkludojn al efektivaĵoj kaj ĝenerale konsciencie agas por efektiviĝi sian fantazion. Kiam ekzistas ia kontakto inter revo kaj vivo tiam ĉio staras bone“.

Al tiuj rezonoj de Pisarev Lenin aldonas proprajn signifoplenajn vortojn: „Bedaŭrinde malmulte estas da tiaspeca revado en nia movado kaj plej kulpaj en tio estas niaj fieraĉaj per sia „sobremo“, „proksimeco“ al „konkreto“ reprezentantoj de laŭleĝa kritiko kaj de nelaŭleĝa „vostismo“.

Estas evidente, ke tia rilato de Lenin al „revo“ kontaktanta al la vivo ne povas esti uzata kontraŭ la esperantistoj, kiuj reale uzas sian lingvon en la celoj de la organizado de internacia kunligo. Esperanto jam ne estas nur revo. En la nuna tempo ĝi ja estas sendube „reala vivo“.

Kiel batali, kiel labori por pravigi sian ekzistadon, tion la progresemaj esperantistoj scias sufiĉe bone. Por ili Esperanto ne estas celo per si mem. Por ili ĝi estas unu el la iloj por helpi al la laboristaro, al la popolo en ĝia historia batalo. La problemo de Esperanto por ili ne estas kaj ne povas esti ia tute memstara, sendependa de ĝenerala politiko kaj klasbatalo, problemo. Klasbatalo, jen estas la fundamento. Kaj pro tio la progresemaj esperantistoj devas batali ne nur por uzado de sia lingvo, por ĝia evoluo kaj disvastigado, sed ankaŭ eduki la adeptojn de Esperanto asimili la leninismajn principojn, studi kaj apliki konkrete la instruon de marksismo-

*leninismo en ilia poresperanta kaj peresperanta agado.*

*Akceptinte la genian lingvon de Zamenhof, ni, bulgaraj esperantistoj, en nia laboro penas kontribui al la batalo sur la kultura kaj ideologia fronto kontraŭ la imperiismo, sub la gvidado de la Bulgara Komunista Partio en akordo kun la leninismaj principoj, por la triumfo de la leninisma amikeco inter la popoloj.*

*Ĉiuj eventoj dum la lastaj jaroj senrefute montris la potencan vivecon de la instruo de Lenin. La leninisma amikeco inter la popoloj disvastiĝis malproksimen ekster la landlimoj de Sovet-Unio: ĝi estas modelo de la amikeco, kiu kreiĝis inter Sovet-Unio kaj la socialismaj landoj, kun la popoloj de la tuta mondo.*

*Tiu ĉi amikeco instruas la popolojn de ĉiuj landoj ŝati la grandan principon de la proleta internaciismo, teni alten la flagon de la nacia sendependeco, batali por daŭra paco inter la popoloj, batali kontraŭ la adeptoj de la „malvarma milito“ kaj ties helpantoj, kiuj sin kaŝas per ĉiuspecaj maskoj de kosmopolitaj ideoj, penante neniigi la nacian suverenecon de la popoloj. Tiaj ekzemple estas la tiel nomataj sennaciistoj en la Esperantomovado (anoj de Sennacieca Asocio Tutmonda — SAT), kiuj kuiris propran reviziisman „teorion“ por anstataŭigo de la naciaj lingvoj per Esperanto.*

*En la projekto de la programo de RKP(b), farita de Lenin, troviĝas jena punkto koncernanta naciajn interrilatojn: „Necesas granda singardemo rilate al la nacia sento de nacioj subpremitaj, akcelo ne nur de fakta egalrajto, sed ankaŭ evoluo de la lingvo, literaturo de laborulaj amasoj de pli frue subpremitaj nacioj, por plena forigo de ĉiuj restaĵoj de heredita postepoko de kapitalismo, malfido kaj malamikeco“.*

*Tiuj vortoj de Lenin estas neniiga anticipa kritiko de ĉiuj provoj de la sennaciistoj, kiuj penas kaŝi sian ve-*

*ran vizaĝon de perfiduloj de la klasbatala laborista movado per reviziismaj pseŭdoteorioj.*

*En la batalo por internacia lingvo oni ne devas kaŝi la ĉiutagajn taskojn de la batalo por starigo de vera egalrajteco inter ĉiuj popoloj kaj lingvoj. La eraraj konceptoj de la sennaciistoj kaj la adeptoj de la interna ideo de la aŭtoro de Esperanto, nebuligas la menson de la esperantistoj kaj puŝas ilin al la tendaro de la burĝa naciismo kaj imperiista kosmopolitismo.*

*Tiujn erarajn konceptojn ĝisfundamente neniigas la instruon de Lenin pri nacia problemoj kaj proleta internaciismo, fundamento de la politiko de la Komunista Partio de Sovet-Unio, kiu estas nevenkebla armilo per kiu la laborista klaso fiaskigas la planojn de la imperiistoj por tutmonda regado.*

*La potenca Lenina spirito de vera internaciismo faras nun de Sovet-Unio, kaj de la tuta socialisma tendaro apogilon de la paco kaj esperon de milionoj da laboruloj, garantion por la libero de la popoloj.*

*Ĉu ni povus prezenti al ni nun la triumfan marŝon de la ideo por paca kunekzistado de la popoloj, la sukcesan batalon de la koloniaj kaj duonkoloniaj popoloj por nacia libereco kaj sendependeco, la grandiozajn sukcesojn de la socialismaj ŝtatoj sur la vojo al socialismo, sen Lenin, sen lia genia instruo, sen la Komunista Partio de Soviet-Unio, sen la Soveta ŝtato kaj sen la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, kies organizintoj kaj gvidintoj estis Lenin kaj lia partio?*

*La grandega Lenin vivos eterne per sia verko en la konscio de la homaro, ĉar lia instruo fariĝis vivanta afero kaj ĉar la laborulaj amasoj de la tuta mondo faris de li kaj de lia instruo standardon en sia liberiga batalo kaj en la batalo por la konstruo de la nova mondo de la socialismo kaj komunismo.*

*Vivu la senmorta verko de Lenin*

V. Majakovskij

**L E N I N**

La matenon helan de la sun'  
 registar- bulten' ombrigis nun.  
 Ne!  
 Ne kredu!  
 Ĉu ordonos vi al fulmo:  
     ĉesu?  
 Ne!  
 Vi ne katenos fortojn de vulkan'!  
 Ĉiam  
 per milpaĝa preso  
     tondras  
     kun alarmo  
     Lenin — lang'.  
 Ĉu la tondro povas esti muta?  
 Ĉu haltigos vi  
 turnigon de ciklon'!?  
 Ne!  
 Ne malfortigas Lenin — volo tute  
 en partia vol' de milion'.

Ĉu mezuros  
     termometroj  
     ard-fervoron!?  
 Ĉu sekunde  
     pulsas  
     Lenin'-a raci'!?  
 Ĉiam fajre bolas Lenin-koro  
 en la brust'  
     de la revoluci'.  
 Ne!  
 Ne!  
 Nn-n-ne!  
 Ni ne povas kredi  
     al bulten- foli'.  
 Nigra ombro  
     iru for de ni!

El la rusa:  
 S. Rublev

Ĥristo Gorov — Hrima

**L E N I N**

Lin ne laŭdas avidaj vultur-fariseoj,  
 nek oferas monerojn je lia memor'.  
 Nomon lian ne benas la papo-lakeo,  
 adoranta la lukson kaj tronon de or'.

Ne muzikas pri Lenin molkordaj orgenoj  
 kaj nek plaĵ burginoj genuas kun dank'.  
 La millanga „Voĉ' de Ameriko“ blasfemas  
 novan vivon florantan en Lenina land'.

Filozofoj ŝajnsaĝaj en la Okcidento  
 erarigas popolon per sia verkar' —  
 sub mantelo senklasa de sia „scienco“  
 ili „virtojn“ reklamas de la kapital'.

Sed nenio makulas la nomon de Lenin,  
 sune brilas ĝi super la vasta terglob'.  
 Maŭzoleon marmoran ĉe l' muroj de Kremlin  
 jam vizitas eĉ negroj, naskitaj en Kong'.

Por la nomo de Lenin la Tero malvastas —  
 kun ĝi flugas tra kosmo raket' post raket'.  
 Vidu nun — eĉ belulin' universa Venuso  
 svingas ruĝan standardon kun serp' kaj martel'.

K. Matusovskij

## VI FLUGU, KOLOMBOJ

Vi flugu, kolomboj, rapide,  
por vi ne ekzistas ja bar'.  
Vi portu, kolomboj, konfide  
saluton al tuta homar'.

Se super ter' vento ekbruos,  
per nub' se kovriĝos ĉiel',  
kaj vin akcipitro ne tuŝos,  
vi trafos ja ĝuste al cel'.

Por homa feliĉ' kaj libero  
kolomboj flugadas trans lim',  
atendas popol' kun espero  
la pacon eternan sen fin',

Vi flugu, kolomboj, pli alten  
en nokto, en luma aŭror',  
invitu l' homaron senhalte  
por paca, ĝojplena labor'.

El la rusa: B. Najdin

Stojan Mihajlovski

## POPOLO RENASKITA, MARŜU

Popolo renaskita, marŝu  
al luma estonteco vi!  
Per la literaturo nova  
novigu sorton ĝis envi'!  
Al la kultur' potenca marŝu,  
tra monda marŝu la batal',  
kaj via devo neŝanĝebla  
vin gvidos al la ideal'!  
Antaŭen! La scienco — suno  
en la animoj brilas nun.  
Antaŭen! Naciec' ne falas,  
se scio vivas en la brust'.  
Senfama estis vi, senglora...  
Eniru historion jam!  
Kaj kune kun aliaj slavo  
krucigu glavon kun la am'!..

Tiel tesalonikaj fratoj  
vigligis avojn niajn do.  
Ho, pasintec' neforgesebla!  
Ho, antikvecoj sanktaj tro!  
Fidela restis Bulgario  
al tiu glora testament' —  
triumfe kaj en suferado  
herois multe sen lament'.  
Benitaj estu poreterne,  
ho vi, Metodij kaj Kiril —  
de la kultur' bulgara patroj,  
de nia lingvo apogil'!  
La nomo via ĉiam vivu  
en nia tutpopola am',  
parolo via la potenca  
eterne fluu tra slavar'!

Tradukis: Zora MI.-Hans

Anna Haava

## MI POVAS

Ne timu, ho karulo  
mi ne ĝenados vin;  
almozpetadi amon  
ne volas la anim'.

Mi froste alrigardi  
vin povas kun fler',  
aŭ ombre preterpaŝi  
vin kvazaŭ kun sever'.

mi povas ja remadi  
sen vi sur vivomar',  
sed povas mi en koro,  
portadi vin sen bar'.

El la estona tradukis:

Hilda Dresen

## Epigramoj

### „ESPERANTISTOJ“

1

Sentas sin esperantisto,  
uzas li la lingvon flue  
kaj obstine kun persisto  
li por pac' ne kontribuas,  
sed fervore por riĉeco  
trovas ĉiam li eblecon.

2

Li ellernis Esperanton  
por vojaĝi en fremdlandon,  
kaj rikanas kun aplombo  
nur per vort' al atombombo...

(Laŭ ideo de Tr. Petkova)



## FRATOJ NOVANSKI

Fratoj Novanski — je ties nomo estas baptita la agrara kooperativo en Ihtiman — malgranda urbeto je distanco de proksimume 2 hora pervagonara veturado de Sofio. Tiu ĉi nomo de la pereintaj en la batalo kontraŭ faŝismo kvar fratoj memorigas, ke ankaŭ nia popolo kiel multaj aliaj, havas siajn familiojn — martirojn. Fratoj Ĉervi, fratoj Roseli en Italio, fratoj Novanski, fratoj Paŝovi kaj multaj aliaj en Bulgario — ĉiuj ili pereis por unu kaj sama afero, en la nomo de unu kaj sama ideo, sed kiom malsame disvolvigas la aferoj en niaj du landoj, kiom malsame vivas kaj laboras la kamaradoj de la herooj, ties gefiloj, ties popoloj...

Jam en la sekvinta jaro post la popola venko je la 9-a de septembro 1944, kelkdekoj da familioj de eksaj kamparaj proletoj, malriĉaj vilaĝanoj, ŝafistoj, brutbredistoj de la naskiĝa urbeto de la herooj decidis unuigi siajn fortojn por ke ili kune batalu kontraŭ la malriĉeco, kontraŭ kiu ili ne povis sin savi dum la jaroj de kapitalismo kaj faŝismo. Jam venis la tempo, por kiu la fratoj Novanski oferis sian vivon. Ĉefrunte de la kooperativo ekstaras la batakkamaradoj de la fratoj, la ŝtato helpis al la kooperativo — ĝi sendis maŝinojn, specialistojn, disponigis kampojn, transirintaj al la ŝtata fonduso post la agrara reformo. Vere, en la komenco la kooperativanoj estis malmultnombraj — la manko de sperto, noviniatoj en la kolektiva terkulturado, ankoraŭ nekonnata en Bulgario, timigis la aliajn. Sed ĝuste pro tio en la kooperativon einiris la plej entuziasmaj, la plej kurajaĵaj, la plej laboremaj.

Ne post longa tempo la kuna laboro komencis tiri kiel traktoro la estintajn malriĉulojn en la marĉo de la mizero. La rikoltoj de la kooperativo

estis pli grandaj ol tiuj de la privatuoj, la laboro per la maŝinoj estis pli facila kaj la enspezoj kreskis de jaro al jaro. Unu post la alia la kooperativanoj konstruis al si brikajn hejmojn, ekipis ilin moderne, sendis siajn gefilojn lerni en la loka gimnazio aŭ en la superaj institutoj en Sofio. La sukcesoj kiel magneto altiras ĉiam pli kaj pli da terkulturistoj en la kooperativo. Nun ĝi jam arecas 8 mil hektarojn — preskaŭ la tuta plugata kamparo de la urbeto.

La Esperantista Societo „Vela Peeva“ en urbeto Ihtiman aktive korespondas kun multaj eksterlandaj esperantistaj kluboj kaj grupoj al kiuj ĝi rakontas pri la heroa vivo de fratoj Novanski kaj pri la grandaj nuntempaj sukcesoj de la agrara kooperativo „Fratoj Novanski“. Ili kompreneble rakontas ankaŭ pri siaj propraj sukcesoj, ĉar multaj el ili membras en la agrara kooperativo kaj laboras en ĝi. La bulgaraj kaj eksterlandaj partoprenantoj en nia 34-a Esperanto-Kongreso pasintjare en Târnovo havis la maloftan eblecon rigardi belegan programon de amatora Danĉista trupo de la Esperanto-societo „Vela Peeva“.

## STILIJAN N. PEŜEV

Hela figuro en la batalo kontraŭ la faŝismo estas ankaŭ tiu de Stilijan Peŝev (partizana nomo Stanĉo).

Naskita en Sofio la 30-an de julio 1920, li kiel lernanto en la tria knaba gimnazio eniris en la vicojn de RMS (Laborista Junulara Asocio). Poŝte kiel studento li estas en la unuaj vicoj de la studentaj bataloj. Laborema kaj sciama Peŝev lernis diligente la marksisma-leninisman literaturon. Li estis progresema junulo kaj vigle partoprenis la agadon de la abstinenculoj, turistoj kaj esperantistoj. Laŭ liaj komprenoj se la homo devas esti bona sociaganto, li ne devas drinki, do li devas esti abstinenculo, li devas ami kaj ŝati la naturon — do li devas esti turisto; li devas havi amikojn en aliaj landoj,



kun kiuj li devas korespondi kaj interkomprenigi, do li devas lerni la internacian lingvon. Kaj Peŝev lernis kun siaj kamaradoj kaj bone posedis la lingvon. Li estis aktivulo en la movado, ĝis kiam li komencis aktivan politikan agadon, kiu ne permesis al li dediĉi pli da tempo al lingvaj studoj. En tiu tempo li ricevis esperantajn revuojn kaj korespondis kun esperantistoj el diversaj landoj kiel Hispanio, Nederlando ka.

En 1939 Peŝev finis la gimnazion kaj fariĝis studento en jura fakultato. Tiam li aktive laboris en BONSS (Bulgara Ĝenerala Nacia Studenta Asocio) kaj partoprenis ĉiujn studentajn batalojn. En 1941 li estis aktiva membro de la kooperativa grupo „Torĉo“ kaj plivigligis la agadon de la kulturdomo „Svetlina“ („Lumo“), kiu disvastigis klarecon inter la laboristaro de la periferia ĉefurba kvartalo „Voenna rampa“. Samtempe li estis respondeculo de la kvartala RMS kaj al tiu ĉi laboro li dediĉis sian junulan energion.

Sed la polico observis lian entuziasman laboron kaj je la 8-a de marto 1942 ĉe kunsido de la gvidantaro oni arestis kaj kruele torturis lin. Li perfidis tamen nenion. Poste oni sendis lin al koncentrejo Krâsto Pole, apud urbo Ksanti, en nuna Greklando. En la koncentrejo li restis 20 monatojn kaj en oktobro 1943 li estis liberigita.

La koncentrejo estis por li vera universitato. Tie li legis „La Kapitalo“-n de Karl Marks, la historion de la filozofio, la historion de la Komunista Partio de Sovet-Unio kaj lernolibrojn pri juro. Tie oni akceptis lin kiel membron de Bulgara Komunista Partio.

Li revenis hejmen, sed ne restis longe.

Liaj samkoncentrejanoj Vlado Triĉkov kaj Goĉo Gopin (lia kuzo) jam estis partizanoj sub la gvidado de la fama Slavĉo Trânski. Stilijan Peŝev havis okazon konatiĝi kun Slavĉo Trânski en la policejo, kie ili estis en unu sama ĉelo. Stilijan Peŝev senpacience atendis sciigon de Vlado kaj Goĉo.

Kaj jen Vlado venis en Sofion kun speciala misio, kaj portis mobilizan invitilon al Peŝev, nome — ke li devas iri en la taĉmenton de Slavĉo Trânski. La revo estis efektivigita, la ĝojo estis grandega, ĉar al unu el la punktoj de la partizana transiro, ilin atendis Slavĉo



Trânski mem. La adiaŭo kun la plej proksimaj homoj — patrino — eksinstruistino, la patro—poŝtovicisto, kaj aliaj, estis korprega, la okuloj plenaj je larmoj, sed Stilijan Peŝev trankvile diris: „La vojo estas peza, ĝi ne estas surŝutita per rozoj, ĝi estas malfacila, sed pro tio glora. Do, ĝis baldaŭa revido! La eventoj rapide disvolviĝas. La venko estas nia. Baldaŭ la patrolando estos libera!“ Li kaj lia kamarado D-ro Georgi Nastev iris al la partizana tendaro.

En tiu tempo la partizana taĉmento plikreskis kaj dividiĝis je du trupoj — unu sub la komando de Slavĉo Trânski iris al Rila-montaro, la dua sub la komando de Denĉo Znepolski—al Balkan-montaro.

Post dektaga streĉa kaj malfacila irado la dua brigado alvenis je la 23-a de majo 1944 apud vilaĝo Batulija, regiono de Sofia, kie iu perfidis ilin. La batalo estis senkompata kaj kruela, pereis la batalionestro Diĉo Petrov, la brigado estis venkita. La partizanoj dissemiĝis je malgrandaj grupoj kaj poste eĉ unuope.

Stilijan Pešev kaj alia lia kamarado kasis sin kelkajn tagojn en la Balkanmontaro sen nutraĵo ĝis kiam la malamikoj malkovris ilin kaj komencis pafi kontraŭ ili. Ambaŭ kamaradoj ankaŭ pafis kaj mortigis du policianojn. La ceteraj multnombraj policianoj bestigis, malgrandigis la rondon ĉirkaŭ la herooj, vundis ilin, poste sukcesis kapti ilin kaj ilin senindulge torturis. Tio okazis la 5-an de junio 1944.

La policianoj irigis la arestitojn al stacidomo Rebrovo, kie oni montris al ili du tranĉitajn kapojn de partizanoj kaj demandis ĉu ili konas la kapojn kaj kies estas tiuj kapoj. Anstataŭ respondi Stilijan Pešev prenis unu el la kapoj, kisis ĝin kaj diris: „Balkan, kara Balkan, ni sekvas vin, fraĉjo, kaj nin sekvas milionoj. La venko estas nia!“

La malamikoj komprenis, ke Stilijan Pešev konas kies estas la kapoj, ili volis, ke li diru iliajn nomojn kaj kie troviĝas la ceteraj partizanoj, sed li silentis. Oni batis lin kruele, ĝis kiam oni sukcesis eligi la aŭdacan respon-

don: „Mi ne diros!“ Denove oni pli kruele batis lin, kaj denove ankoraŭ pli aŭdacan respondon: „Mi ne diros!“ Kvarfoje oni torturis lin, sed oni ne sukcesis eligi eĉ vorton de perfido.

Finfine oni irigis lin kaj lian kamaradon al la policgardostarejo kie estis arestitaj aliaj sep personoj kaj la sek-vontan tagon per kamioneto oni kondukis ilin al la stabo de generalo Kočo Stojanov. La generalo ordonis, ke oni konduku la arestitojn en direkto al vilaĝo Stolnik kaj ĉe ŝajna provo de forkuro oni mortigu ilin.

Tiel pereis la batalinto por popola libero Stilijan Pešev. Li pereis, sed la popolo ne forgesis lin. Nun la kulturdomo de kvartalo Nadejda en Sofio portas lian gloran nomon — „Stilijan Pešev“. Ĝi disvolvas vastan kulturan agadon kaj ankaŭ esperantan agadon — oni organizas esperantajn kursojn por gelernantoj. Do, la junuloj sekvas la vojon de sia patrono.

I. S.

## LA 48-A UNIVERSALA KONGRESO EN SOFIO

La estraro de Sofia Esperanto-societo sendis al UEA la jenan leteron:

„Je la 27-a de februaro 1961 la Esperanto-societo „Maksim Ĝorkij“ post konkreta kaj detala pridiskuto decidis inviti la 48-an Universalan Kongreson de Esperanto en Sofio:

Nia societo havas 600 regulajn membrojn. Inter ili multaj estas spertaj kaj konataj ekster nia lando. Krom tio en Sofio funkcias ankaŭ fakaj Esperanto-societoj: Fervojista, Poŝtista, Tramista, Studenta kaj Blindula. Do, entute, nun en Sofio estas 947 organizitaj esperantistoj. Ĉis la kongreso en 1963 ni klopodos duobligi la nombron de la organizitaj membroj.

En Sofio ekzistas normalaj kondiĉoj por okazigo de Universalaj Kongresoj. Ni havas du salonojn kun po 2000 sidlokoj kaj nun estas konstruata granda salono kun 3500 sidlokoj.

Al la diversaj fakkunsidoj ni trovos konvenajn aŭditoriojn en la nova konstruaĵo de la Ŝtata Universitato.

Ni elektos la plej spertajn kaj la plej laborkapablajn samideanojn en la Loka Kongresa Komitato. Senpacience la membroj de nia societo atendas la decidon de UEA-Komitato kaj kun entuziasmo ni laboros por modele organizi la 48-an.

Ĉar neniam okazis en Bulgario UK de Esperanto ni kredas, ke al la kongreso aliĝos pli da kongresanoj ol ordinare tio okazas. Multaj ankaŭ venos por vidi nian landon.

Estu certaj, karaj samideanoj, ke ni faros ĉion, kio estas laŭ niaj fortoj kaj ebloj por garantii plensukcesan kongreson.“

Prezidanto: Canko Murgin  
Sekretario: Stojan Moraresku

## PRI MALSAMIDEANOI EL SAT

En la esperantista movado ekzistas stranga sekto fanatike apartigema kaj sisteme kontraŭa al ĉio ajn ekster si mem kaj sia propra mem-elbakita pseŭdo-progresema ideologio la SAT-anismo. Karakteriza estas la pseŭdonimo, kiun adoptis la (de siaj adeptoj adorata kvazaŭ idolo) fondinto de tiu devojiginta asocio. Kontraŭo li estis de ĉio ekster sia propra „hereso“, pri kiu li fieris en nekredebla maniero, kvankam ĝi kondukis lin al la plej aberaciaj konsekvencoj. Ekzemple forigon de la naciaj lingvoj ekrevis la blankbarba profeto; naciojn li komparis al kazernoj, li iĝis apenaŭ kapabla distingi inter socialismo kaj faŝismo... Skribinte multajn malsagaĵojn, li fine sin pendigis. Sed tio nur kreskigis la blindan fanatikecon de la bedaŭrindaj kaptitoj de lia patologia mensoknedado, senlace daŭrigita de posteuloj.

Venis jam la tempo por senmaskigi la lupon el sub la ŝafa vesto, kiu trom-

Noto de la redakcio. Ni publikigas la artikolon de la pariza esperantisto Paul Ciliga kun la noto, ke ni same opinias pri SAT. Vere SAT transformiĝis en sektaneca, reviziisma kaj kontraŭsoveta organizaĵo, kiu havas nenion komunan kun la klasbatalo kaj socialismo. Detalojn pri SAT ni publikigos en la maja numero de „Bulgara Esperantisto“ — 1961.

pis kaj daŭre trompas tiom multe da reale progresemaj esperantistoj.

„Bulgara Esperantisto“ pasintjare jam konigis parton de la vero, sed tio — ho ve! ne sufiĉis por ĉiujn senmistifikigi precipe en nia laborista movado, kiun SAT pretendas reprezenti. La ekzisto de vere proletaj asocioj, kiel ekzemple la Labor-Esperantista-Federacio, neniel limigis almenaŭ ĝis nun la uzurpemon de la sektanoj. La vera problemo estas: ĉu la esperantistaj laboristoj kaj la avangardaj fortoj de nia movado daŭre toleros la koloron (dube ruĝan!), kiun senskrupulaj ideologoj nepre volas trudi sub la formo de spirite delogema SAT-anismo? Kiom longe oni ankoraŭ toleros la trompon de tiuj — verdire — maldelikataj logistoj?

Necesas jam forpeli la ultrareakcian elementon, kiu (sub la formo de SAT-estroj) semas dividon, konfuzon kaj idean kancerajon en la kapojn de honestaj esperantistoj, apenaŭ kapablaj eĉ imagi tiom da senhonta subfosado, histeria kalumniado kaj malnobla kritikaĉado — sub la ŝirmilo de klasbatala frazaro, delonge malplenigita de sia vera enhavo.

For la maskon!

Paul CILIGA

---

### GRAVA SCIIGO

*CK de BEA en sia kunsido ie la sepa de februaro 1961 decidis aranĝi*

#### 5-TAGAN EKSKURSON AL ODESA

*per vaporŝipo, kiu ekveturos el la haveno de Varna je la 10-a horo la 8-an de junio 1961.*

*La restado en Odesa estos 3 tagoj (de la 9-a matene ĝis la 11-a vespere). Dumtempe okazos rekontiĝo kun geesperantistoj el Odesa. La reveno en Varna estos la 12-an ĉirkaŭ je la 18-a horo.*

*La prezo de la ekskurso estas 570 levoj.*

*En la prezo estas inkluzivitaj: vojaĝelspezoj de Varna ĝis Varna, manĝaĵo dum la vojaĝo kaj restado, la ekskursoj kaj vizitoj al turismaj lokoj per aŭtobusoj de „Inturist“, la pasportaj vizoj kaj 6 novaj rubloj poŝmono.*

*Detalajn informojn donas la kancelario de la Asocio, bulv. Dondukov 57, tel. 7-46-01, Sofio, kaj la estraroj de la lokaj societoj.*

**SOFIO.** Dum du kunvenoj de societo „Maksim Gorkij“ estis aŭskultitaj raportoj de iamaj redaktoroj de „Bulgara Esperantisto“. En 30 jarkolektoj, depost ĝia fondiĝo la heroldo de la Esperanto-movado en nia lando eĉ sub la plej fortaj premoj de la faŝismo, la redaktaj komitatoj preskaŭ senescepte restis fidelaj al la altaj principoj de la vera internaciismo, por paco kaj kontraŭ la milito kaj ŝovinismo.

La kultur-kleriga laboro en la ĉefurba societo deziras plibonigi la rezultojn de la ĉiusemajnaj kunvenoj. La estraro invitis plurajn gekamaradojn raporti al la societaj kunvenoj pri interesaj novaĵoj el ilia propra fako. La forstisto raportos pri la nova ŝtata plano rilate la arbarojn, la kuracistoj — pri la plej modernaj kuracmetodoj kaj la inĝenieroj — pri la problemoj de nia urba transporto kaj pri la novaj konstruobjektoj en la lando. Tiel la societo disvolvos utilan kultur-klerigan agadon kaj ĉiu membro transformiĝos en aktivan partoprenanton de la kultura societa vivo.

La societo „Maksim Gorkij“ iniciatis la fondon de komuna, tuturba esperantista ĥoro sub la gvidado de sperta muzikestro.

La popola kulturdomo „Stilijan Peŝev“ en la Sofia kvartalo „Triagálnik“ jam dum la lernojaro 1959/1960 malfermis E-kurson por gelernantoj de 3-a ĝis 7-a klaso. La kurso estas daŭre gvidata de la entuziasma instruistino J. Kozaĉeva. La lernomaterialo estas instruata laŭ la rekta metodo po du horoj semajne. La gelernantoj jam bone progresis. Ili povas kanti kelkajn kantojn en Esperanto. La intereso estas plialtigata de la internacia korespondado, kiun ili jam komencis kaj vigle subtenas.

Venontjare la samaj gelernantoj perfektigos en la lingvo kaj ankoraŭ pli disvastigos la praktikan utiligon de Esperanto.

La instruistoj-esperantistoj ĉie en la lando devas senprokraste ekagi por la instruado de Esperanto al la diversaj gelernantoj.

**J. Kozaĉeva**



„Virina rondo“ plenumas programon

Okaze la 8-an de marto, la internacia tago de la virino, la virinoj de societo „Maksim Gorkij“ aranĝis specialan, virinan vesperon. La

pionira grupo de k-dino Kozaĉeva salutis la kunvenon per belaj vortoj kaj entuziasmaj esperantaj kantoj. K-dino R. Rajnova faris bonegan prelegon pri la nova virino, libera konstruanto de la socialisma vivo, strebonta al paco kaj bonfarto por ĉiuj popoloj, por siaj propraj infanoj. La artistino B. Beleva bonege recitis la hindan fabelon de Julio Baghy pri la kreado de la virino el la mara ŝaŭmo. Bonega malgranda grupo, gvidata de k-dino Rajna Arnaudova kantis belegajn kantojn. Ĉiuj paroladoj, deklamaĵoj kaj kantoj estis en Esperanto, en tre alta nivelo. Juna franca laboristo en fabriko por kudromaŝinoj, hazarde gastante en nia lando, salutis la kunvenon. Post la kunveno estis aranĝita komuna vespermanĝo en la restoracio „Moskva“.

**St. Kadiev**

**PAZARĜIK.** En la fino de februaro okazis la jarkunveno de nia societo „Radio“. Ĉeestis reprezentanto de CK de BEA k-do A. Grigorov, gastoj el proksimaj loĝlokoj: Peŝtera, Momina Klisura, Cerovo kaj reprezentanto de la lokaj aŭtoritatoj. Partoprenantoj en la funkciantaj kursoj plenumis belartan programon. La raportoj kaj la debatoj okazis nur en Esperanto.

Dum la raportita jaro la societo havis 79 membrojn, el kiuj 40 abonantoj al „Bulgara Esperantisto“. La societo havis 34 abonojn al „Nuntempa Bulgario“.

Funkciis 9 Esperanto-kursoj kun 136 partoprenantoj en la komenco kaj 97 en la fino. De la lastaj tamen nur 35 fariĝis societanoj. Do, ankoraŭ multe ni devas labori por ke ni povu varbi al la societo ĉiujn novajn esperantistojn.

Kvinfoje la societo aranĝis disaŭdigojn per la urba radiocentralo kaj pli ol 20-foje ĝin utiligis pri anoncoj. Kelkaj el niaj kunvenoj estis dediĉitaj al Svedio, Japanio, Meksikio, UEA-kongreso ktp. kun magnetofonbendaj programoj speciale senditaj al ni. Sur ĉefaj stratoj ni havas 2 vitrokestojn. La societo aranĝis ekskursojn al vilaĝo Rozino, Levskigrad, Kazanlâk, Velingrad kaj Plovdiv. Kelkaj societanoj veturis alilanden.

La societo partoprenis en la konstruado de „Esperanto-montodomo“ sur Vitoŝa kaj la farado de marmora plato por Nedelĉo Nedelĉev — Ĵan sur montopinto Botev en Balkanmontaro. Vigle kaj amase ni partoprenis la nacian kongreson en Târnovo kaj la nacian junularan esperantistan konferencon kaj balon en Plovdiv.

Por la societa biblioteko ni havigis 80 librojn.

La societa sekretario ree aranĝis laborbrigadon „Esperanto“, kiu riparos la lernejon „K. Velickov“. La faritan laboron oni kalkulas al pli ol 10 000 levoj.

Oni jam komencis verki la historion de nia urba Esperanto-societo, kies resumo ne post longe aperos en la paĝoj de nia organo.

**P. Arnaudov**

**RUSE.** La jarkunveno de societo „Libero“ okazis la 26-an de februaro en la salono de „Patrolanda Fronto“. Mallongan literaturan programon plenumis la kursanoj de unua mezlernejo, gvidataj de la studento Momčev.

La ĉeestantoj per 1-minuta silento honoris la memoron de la forpasinta societano Anka Stefanova.

Post tralego de la raporto de la estraro kaj de la kontrola komitato sekvis kritikoj kaj rekomendoj por estonta agado. La prezidanto de la junulara sekcio Ivan Ljuckanov diris, ke la gejunuloj, kiuj estas la freŝaj fortoj en la vivo de nia movado, devas streĉi serioze siajn fortojn antaŭ la novaj grandaj estontaj taskoj. La ĝisnunaj sukcesoj de la junularo en Ruse, kiuj estis laŭditaj en „Bulgara Esperantisto“, jam ne sufiĉas. La junulara grupo, kiu vizitis la konferencon kaj balon en Plovdiv, gvidita de la direktorino de la mezlernejo, invitis la 3-an konferencon kaj balon dum 1962 en Ruse.

La proponoj pri konkurado kaj invito de la 35-a enlanda Esperanto-kongreso dum 1962 estis akceptitaj entuziasme.

La saluttelegramoj al la CK de BKP kaj BEA estis akceptitaj per aplaŭdoj.

La kunvenon salutis la hazarde gastanta en Ruse juna franca laboristo-esperantisto Marcel Grimaud el urbo Romans (Drôme), kiu esprimis kontenton kaj dankon pri la atento kaj afableco de liaj akompanantoj.

Post la elekto de nova estraro, prezidanto, sekretario, post la fermo de la kunveno, la partoprenintoj kun sia franca gasto kaj standardo iris al la monumento de la libereco kaj faris komunan foton.

**Boris Kavalĝiev**

**VRACA.** La urba societo okazigis sian jarkunvenon, kiu estis malfermita de la kantgrupo ĉe la teksta teknika lernejo gvidata de la lernantino Penka Pecanovska.

Analizan raporton pri la agado de la societo dum 1960 faris ĝia longjara prezidanto k-do R. Tričkov. En siaj eldiroj la ĉeestantoj proponis: nomigon de strato „Esperanto“, stabiligon de junulara grupo, plivastigon de la internaciaj kontaktoj kaj propagando.

**E. Daskalov**

**PLEVEN.** La 12-an de marto 1961 en la klubo de BKP sur placo „Svoboda“ („Libero“) estis malfermita la unua en la urbo kaj distrikto Esperanta ekspozicio. La vizitantoj havis eblecon vidi parton el la vigla internacia korespondado de la esperantistoj el la urbo, poŝkartojn, fotojn, Esperantan literaturon kaj gazetojn ktp. Oni ekspoziciis ankaŭ materialojn el la vivo kaj agado de la konata bulgara antifaŝisto-esperantisto Trifon Hristovski — „La bulgara Ostrovski“.

**Zdr. Velikov, R. Raĉev**

**BJALA.** Fundamenta tasko de nia societo „Paco“ estas malfermi kaj bone funkciigi kur-

sojn por komencantoj — por civitanoj kaj por lernantoj.

Ankaŭ dum tiu ĉi jaro dank' al la helpo de la direktoro de la gimnazio kaj la Komsomola organizaĵo estis malfermita kurso por lernantoj. Kursgvidanto estas Jordan Iliev el valaĝo Ceno, kiu sindone instruas la internacian lingvon, ligante la materialon kun la praktika vivo kaj precipe el la vivo de la lernantoj.

La kurson partoprenas 30 gelernantoj, kies respondeculino estas la lernantino Borjanka Tjurkeĝieva, kiu energie zorgas pri la regula vizitado kaj okazigo de la kurso.

Antaŭ kelkaj tagoj la tuta societa estraro gatis al la lernanta kurso. La leciono pasis fruktodone kaj la kursanoj montris grandan aktivecon. Fine k-do A. Nedjalkov, partopreninto en la 44-a Universala Kongreso en Varsovio, rakontis pri la kongreso.

Ĉiuj gelernantoj entuziasme lernas Esperanton kaj ne post longa tempo antaŭ ili malfermiĝos la vasta fenestro al la tuta mondo!

La 18-an de februaro okazis la jarkunveno de la societo „Paco“. Ĉeestis ĉiuj membroj kaj multe da gastoj, inter kiuj estis ankaŭ la k-do Dim. Dojĉev, membro de CK de BEA.

Raporton pri la agado de la societo tralegis la sekretario A. Nedjalkov. En la raporto kaj en la eldiroj de la partoprenintoj estis montritaj la mankoj en la laboro kaj signifaj la novaj taskoj, kiujn la societo devas plenumi en la estonteco.

La nova estraro, kiun la kunveno elektis, konsistas precipe de junaj kaj energiplenaj esperantistoj. Tio estas garantio por estontaj sukcesoj de Esperanto en nia urbo.

Fine k-do D. Dojĉev salutis la kunvenon je la nomo de BEA kaj per ardaĵaj paroloj substrekis la signifon de Esperanto — la lingvo de amikeco kaj solidareco inter la popoloj, batalantaj por paco kaj justeco.

**Ang. Nedjalkov**



**Post la jarkunveno en Velingrad**

**SEVLIEVO.** La jarkunveno de nia societo okazis je la 26-a de januaro. La societanoj vigle pridiskutis la ĝisnunan agadon. Oni faris malmulton por varbi junajn membrojn.

Oni sciigis, ke jam estas kolektita la necesa bronzo, per kiu estas muldota la Zamenhof-reliefo por la strato „L. L. Zamenhof“.

Je la fino de la kunveno la malnova esperantisto S. Kalimenov deklaris mon-kaj libro-donacon por fondo de societa biblioteko. Lia ekzemplo estis tuj sekvita kaj nur en kelkaj minutoj estis kolektita la sumo de 800 levoj por libroj. La nova jaro komenciĝis bone kaj ekzistas ĉiuj kondiĉoj por ke la societo fariĝu modela.

### B. Mandeva

**VIDIN.** La 10-an de februaro la loka societo „Espero“ organizis sian jarkunvenon. La societo havas 30 membrojn. Dank' al la prezidanto de la loka komitato de bulgara-soveta amikeco ni jam havas oportunan kunvenejon. Estis substrekita la nesufiĉa atento al la agado inter la gelernantoj, pri kio la nova estraro nepre devas zorgi.

### G. Simeonov

**KÂRĜALI.** La 16-an de februaro en la bela salono de la Distrikta komitato de BKP la urba E-societo „Stelo“ kunvokis siajn membrojn por la jarkunveno. Ĉiu homo ĝojas nun vidante ĉe kiaj favoraj kondiĉoj laboras la esperantistoj. Multaj inter ni memoras pri la jaroj kiam ili estis persekutitaj kaj malliberigitaj. Sur nova hela vojo marŝas nun nia movado kaj ĝi gvidas nin al la junularo.

En nia urbo dum la kuranta jaro apartan sukceson havis la kursoj gviditaj de I. Savova kaj K. Teneva, ambaŭ instruistinoj pri franca lingvo. Riĉan programon antaŭ la kunveno prezentis la gelernantoj de k-ino I. Savova. Ili kantis kaj deklamis en modela Esperanto.

La raporto de la societa prezidanto Sim. Petrov interalie skizis ankaŭ la projektojn pri la estonteco: propagando inter la gejunuloj, novaj kursoj en la lernejoj kaj uzinoj, malfermo de klubejo.

### M. Mihajlova

**GARA LEVSKI.** Nia jara kunveno okazis la 31-an de januaro. La lernantoj de la Muzika lernejo malfermis la kunvenon kun la esperantista himno „La espero“. La orkestro kun muzikestro k-do J. Angelov, nova esperantisto, ludis kelkajn melodiojn el la operoj „Traviata“, „Hernani“ kaj bulgarajn popolajn kantojn k.a. Estis kelkaj deklamaĵoj.

Raportis pri la jara agado de la societoj ambaŭ prezidantoj k-doj Kovacaliev por la urba societo „Trumpetisto“ kaj St. Kolev por la fervojistoj. La diskutado estis tre vigla — en ĝi partoprenis 14 membroj.

En la urbo funkcias du kursoj. Ĝojiga estas la fakto, ke ilin vizitas kelkaj gepatroj kune kun siaj infanoj.

La societoj decidis aranĝi printempan vesperfeston, kiu estas vizitota ankaŭ de esperantistoj de Esperanto societoj el la urboj Pleven, Sviŝtov, Loveĉ kaj vilaĝo Pordim.

### K. Uzunova

Dimanĉe, la 12-an de marto, grupo de dek esperantistoj, membroj de urba societo „Trumpetisto“, frunte de la prezidanto Iv. Kovacaliev, sekretariino Nadejda Zaharieva, kasistino Marija Jordanova, kursgvidanto Bejko Markov vizitis la urbon Pleven kaj la Esperanto-ekspozicion, organizitan kaj aranĝitan de la Esperanto-societo „Eterna amikeco“ en la sama urbo.

Ĝuste je la 10-a horo la juna, entuziasma kaj brila oratoro Z. Velikov, prezidanto de la societo, solene malfermis la ekspozicion per konvena parolado, kiu faris bonan impreson. Ĉe estis reprezentantoj el vilaĝo Begleŝ kaj multaj esperantistoj kaj civitanoj el Pleven. Estis ekspoziciitaj diversaj interesaj materialoj: revuoj, libroj, poŝtkartoj, leteroj bele afrankitaj preskaŭ el la tuta mondo, albumoj ka., kiuj vekis en la publiko admiron kaj intereson lerni la internacian lingvon Esperanto.

En la sama tago la ekspozicio estis vizitata de pli ol 500 geĉivitanoj kaj gelernantoj. Ŝi daŭros tutan semajnon.

Posttagmeze nia grupo ekskursis al Kajlaka — la belega promenloko de la plevenanoj. La vetero estis favora kaj ni revenis en Levski tre kontentaj kaj entuziasmitaj.

### B. Markov

**ORJAĤOVO.** La E-societo en la urbo malfermis kurson por oficistoj en la urba konsilantaro, gvidata de k-do N. K. Kocev. En la kurso partoprenas la prezidanto mem de la urba konsilantaro, la vizprezidanto kaj 12 aliaj oficistoj.

Krom tio en la urbo nun funkcias du aliaj kursoj por komencantoj. Unu el ili estas gvidata de nia malnova s-ano G. Stanev kaj la alia de s-ano Doĉo Dimitrov.

### Nikola Kocev

**POLSKI TRÂMBEŜ.** Pridiskutinte la kondiĉojn de la konkurado, nia aktivularo vigle ekagis por bone prezenti la societeton. Rezulte, ni jam atingis la kontrolan ciferon pri la membroj (jam pli ol 30) kaj la ciferon pri la abonantoj (jam 51). Do, la eblecoj ne estas ĝisfine utiligitaj!

Krom la ekzistantaj 3 lernejoj kaj 1 civitana kursoj, jam ekfunkciis nova laborista kurso ĉe fabriko „Unua de majo“ kun 12 gekursanoj. Ĝin gvidas la fervora esperantisto Zdravko Nikolov, laboristo mem. Baldaŭ ili estos societanoj.

Dum la pasintaj monatoj du gravaj junulaj delegitaroj vizitis nian gimnazion: soveta kaj jugoslava, tute oficialaj. Ili estis impresitaj de nia Internacia klubo, kies ornamaĵo kaj enhavo estas tiel forte penetritaj de la esperantismo. Ĉiuj gastoj esprimis sian kontentecon, ke Esperanto ankaŭ partoprenas en la Interŝanĝo de korespondantoj, en la internacia amikeco kaj en la batalo por paco.

### Hrisman



G. Anastasov

PRINTEMPA KANTO



Onklo Sam al Kubo: — Nu, ĉesigu vian kanton, ĉar vi vekos mian kontinenton



— La rubojn en la korbon!

DAGO HAMERŜELD  
EN KONGO

Sub internacia flago  
amerikan  
politikon  
nun efektivigas Dago!


AMO

En ĝia infero  
ne estas sufero.

AMA DIALOGO

Mi al ŝi : — pasero!  
Ŝi al mi : — ansero!

D. Donev



Post la perdo

MIRAKLO

Pastro parolas al infanoj pri la mirakloj. Por provi ĉu la infanoj bone komprenis lin la pastro demandas etan knabon:

— Vaĉjo, se vi aŭdis, ke tegmentisto falis teren de la katedrala turo, kaj ne vundiĝis. Kio estas tio?

— Tio estas hazardo!

— Nu bone, sed kiam tio okazis duan fojon, kio ĝi estas?

— Feliĉa ŝanco!

— Hm. . bone! Sed se vi aŭdis, ke tio okazis trian fojon. . .

— Ĝi estas mensogo!

## JUNULARO SUR POSTENO

### LA JUNULARA BALO KAJ KONFERENCO EN PLOVDIV

La vagonaro flugrapidas al Plovdiv. En la kupeo regas bonhumoro. La vagonaro flugas! Sed kiel malrapida ŝajnas al mi tiu flugado, kiel teda! Mi volus esti tuj en Plovdivo, en la urbo kie okazas la II Tutlanda Junulara Balo kaj Konferenco. Ĉe la stacidomo granda verdblanka slogano bonvenigas la gastojn. En la klubejo la plovdivaj esperantistoj — niaj zorgemaj dommastroj salutas nin kiel unuaventinajn gastojn. Ili estas tiel okupitaj, ke ni preskaŭ ne povas interparoli. Imagu, pli ol 400 gejunuloj alvenas de aliaj lokoj. Vizitintoj de 33 diversaj urboj kaj vilaĝoj jam aliĝis. Lastaj antaŭpreparoj. „Dum la nokto alvenas la grupo el Varna. Je la kvara ni devas esti ĉe la stacidomo“, aŭdas mi. Konstanta deĵorado ĉe la stacidomo — la plovdivanoj zorgas pri ĉiuj alvenintoj, montras al ili la loĝejojn.

Je la 8-a la pordoj de la restoracio „Trimoncium“ vaste malfermiĝas por akcepti en siaj salonoj la grandan aron da gajaj esperantistoj. Mi aŭdas salutvortojn, malnovaj amikoj renkontiĝas kaj rapidas paroli, kvazaŭ post nur unu horo ili disiĝos. Ĉiĉ sonas nia vere belega Esperanto.

Sed atenton! En la salono eksonis la konata himno de la tutmonda junularo. Multfoje mi aŭdis ĝin, multfoje mi mem kantis ĝin, sed nun ĝi sonas al mi iom alie. Nun 600 starantaj esperantistoj aŭskultas ĝin. Sur la podio estas la prezidanto de la Junulara grupo en Plovdiv — k-do D. Vasilev. Li kortuŝe bonvenigas la ĉeestantojn kaj malfermas la balon. Salutis la Balon la Prezidanto de la Junulara Sekcio ĉe BEA — S. Simeonov, Reprezentanto de la Komsomolo en Plovdiv kaj la sekretario de BEA — V. Oljanov. „La junularo — tio estas la printempo de la vivo“ — diris li interalie.

Ĉu mi povus rakonti pri ĉio?.. Kantis la aktoroj de la Plovdiva operejo, laŭreatoj de la Dimitrova premio Penka Koeva kaj Aleksej Milkovski. La amatora grupo el vilaĝo Bodrovo apud Ihtiman, 20 belaj knabinoj blindigas vin per ridetoj kaj flamaj rigardoj. Belege sonas en la junaj buŝoj niaj Esperanto-kantoj kaj vi sentas vin pli ol fiero.

Dancoj, muziko, kantoj. Diversaj ĉapeletoj, kromoj kun verdaj steloj ornamas la junajn kapojn.

En la apartaj anguloj formiĝis grupetoj de kie estas aŭdata forta rido. Mi alproksimiĝas al unu grupo. Multaj gejunuloj ĉirkaŭis la maljunan, 78-jaraĝan esperantisto-veteranon D. Malĉev. La jaroj ne forprenis de li la energion, la entuziasmon de la juneco kaj la gejunuloj kun granda atento aŭskultis liajn reme-

morajn. Apud ni aperis alia konata esperantisto — R. Triĉkov el Vraco. Li denove gajigas nin per humoraĵoj. Estas la 4-a. La partoprenantoj jam direktas sin al la hejmoj. Morgaŭ novaj taskoj kaj zorgoj atendas nin.

La salono de la Ūrba Komitato de Bulgara Komunista Partio iom post iom pleniĝas per gejunuloj. Tie ĉi ni vidas la reprezentantojn de preskaŭ ĉiuj junularaj grupoj en la lando, de la lokaj ĵurnaloj, de Bulgara Telegrafa Agentejo kaj Radio-Plovdiv. La elektita prezidantaro okupas la lokojn kaj la Dua Junulara Konferenco estas malfermita. S. Simeonov prelegas pri la taskoj de la Esperanto-grupoj kaj entute de la Esperanto-junularo. Grava kondiĉo por rezultoplena kaj grandskala agado en la junularaj medioj estas la viglaj kontaktoj kun la Komsomolo.

La disvolvo de celkonforma kaj enhavoplena internacia korespondado — al tio devas turni sian atenton ĉiu junulara grupo, ĉiu aparta esperantisto.

Per organizado de parolantaj rondoj, konkursoj, pli interesaj kaj ĝojgaj kulturklerigaj kunvenoj, pli da ekskursoj kaj amuzoj ĉiu junulara grupo altiros al si pli da junaj esperantistoj. Apartan atenton oni devas turni al organizo de uzinaj, lernantaj kaj studentaj grupoj. La ligoj inter la lokaj junularaj grupoj kaj la centra estraro devas esti konstantaj. Pri ĉiu interesa okazintaĵo oni devas nepre skribi kaj tiam la kunlaboro en la asocia organo „Bulgara Esperantisto“ estos konstanta.

La junuloj montris viglan partoprenon en la diskutado. Reprezentantoj el Dimitrovgrad, Levskigrad, Vraco, Varna rakontis pri siaj sukcesoj, malfacilaĵoj, donis interesajn proponojn rilate la laboron de la junularaj grupoj.

Ni estas certaj, ke tiu interŝanĝo de sperto donos siajn bonajn rezultojn kaj ni rikoltos ilin baldaŭ.

En la kadroj de la Dua tutlanda Junulara Balo kaj Konferenco la 5-an de februaro okazis oratora konkurso.

La temoj de la konkurso estis: „Kiel plej efike propagandi inter la junularo“ kaj „Esperanto, la internaciismo, la patriotismo kaj la kosmopolitismo“.

Antaŭ la ĵurio: A. Grigorov, R. Triĉkov kaj Iv. Ŝivarov aperis kvar gejunuloj el tri urboj, ĉiuj elektante la unuan temon.

Kun granda intereso la partoprenintoj aŭskultis la prelegojn, kiuj estas je sufiĉe alta nivelo. Por unua fojo en nia lando okazas oratora konkurso, sed ĝi havis bonan efikon. La unuan premion gajnis D. Ĉalakov el Burgas, la duan D. Ĉolakova el Sofio kaj la trian — S. Simeonov, ankaŭ el Sofio.

Finiĝis la Dua Tutlanda Balo kaj Konferenco. Plenaj je impresoj la partoprenintoj revenis al siaj urboj kaj vilaĝoj kun multe da ĝojo, entuziasmo kaj energio. La junuloj promesis daŭre labori per Esperanto por la paco kaj socialismo.

Delka Ĉolakova



## LERNOLIBRO DE ESPERANTO

*de Asen Grigorov*

Tre konata kaj disvastigata estas la koncepto, ke „animo“ de la instruado en la lernejo estas la instruisto. De la bonaj manieroj de instruado, aplikataj de la instruisto, dependas en konsiderinda grado la sukcesoj de la instruado mem. En la pasinteco regis por iom da tempo inter la ĝeinstruistaro koncepto, ke la instruisto por sia instruado ne bezonas lernolibrojn. Sed ne post longa tempo la sperto montris la mankojn kaj la malprosperon de la instruado pro la neuzo de bonaj lernhelpiloj kaj oni konvinke komprenis la gravecon de bone verkitaj lernolibroj, se oni volas vidi kaj atingi la sukcesojn de la ĝenerala instruado. Do, nun ĉiu estas profunde konvinkita, ke la bona kaj sukcesa instruado dependas ne nur de la bonaj kvalitoj de spertaj instruistoj, sed ankaŭ de la kvalitoj de bone kaj laŭ la postuloj de la metodiko verkitaj lernolibroj.

La lernolibro de Esperanto de Asen Grigorov estas bone konata al la esperantistoj en nia lando. Ĝi jam havas kvar eldonojn. En la unua eldono estis menciite, ke la lernolibro estas verkita laŭ la metodo de la sovetia esperantisto S. Rublev. Nun la Bulgara Esperantista Kooperativo eldonas la lernolibron de A. Grigorov stencilite en miloj da ekzempleroj. Laŭ ĝi oni gvidas kursojn en urboj kaj vilaĝoj, ĉar mankas aliaj lernolibroj.

La lernolibro estas tre necesa al la kursgvindantoj kaj ĝi devas esti modela en ĉiu rilato. Tio devigas kaj la aŭtoron, kaj la eldoniston esti tre atentaj kaj postulemaj kaj ne allasi erarojn, ĉar la komencantoj ne povas vidi kaj gustatempe korekti ilin.

Nia tasko nun ne estas pristudi la lernolibron el metodika vidpunkto, kiu estas tre grava kaj diskutinda problemo. Tion povas fari aliaj esperantistoj en aparta speciala artikolo. Ekzemple diskutinda estas la ordo de la gramatika materialo. En la lernolibro oni instruas la prefikson *ek-* en 20-a leciono, *dis-* en 23-a, la prefikson *re-* en 24-a leciono, en la fino de la lernolibro.

La materialo en la lernolibro de A. Grigorov estas dividita en 24 lecionoj. La gramatikon oni instruas kvazaŭ ne rimarkite, sen detalaj klarigoj, sed laŭ tiu maniero oni donas tre supraĵajn sciojn kaj se la lernanto volus profunde lerni la lingvon, li nepre devas serĉi aliajn pli detalajn lernolibrojn.

Mia tasko nun estas montri kelkajn erarojn allasitajn en la lasta stencilita eldono. Mi ne montros multajn preserarojn (ekz. sur paĝo 8-a — malata anstataŭ malalta; sur paĝo 12-a — oznaĉava anstataŭ okonĉava; sur paĝo 14-a — malgrada anstataŭ malgranda; piŝuŝta an-

stataŭ piŝeŝta; sur paĝo 17-a — fracaj anstataŭ francaj; sur paĝo 18-a estas uzita la vorto „amerika“ anstataŭ „usona“; sur paĝo 19-a — knabonoj anstataŭ knabinoj; sur paĝo 23-a „raven“ anstataŭ „razliĉen“ (ne „razen“); fortiĝi anstataŭ fortiĝi, kunvento anstataŭ kunveno; sur paĝo 33-a — maŭ anstataŭ naŭ; sur paĝo 38-a per anstataŭ por; sur paĝo 42-a kuij anstataŭ kiuj; alteko anstataŭ alteco; sur paĝo 44-a — vizoton anstataŭ viziton; sur paĝo 46-a — pli anstataŭ pri; sur paĝo 47-a — legelibro anstataŭ legolibro; sur paĝo 49-a — agrumentoj anstataŭ argumentoj; sur paĝo 63-a — ablecon anstataŭ eblecon (kaj estas ankoraŭ multaj, multaj aliaj, kiujn mi ne citos).

Sur paĝo 21-a A. Grigorov skribas: „Granda mitingo estis hieraŭ en Bukureŝto“. Ĉu ne estas pli bone diri „okazis“ anstataŭ „estis“? La aŭtoro skribas „rumana tradukisto tradukis“. Ĉu eventuale ne estus pli bone anstataŭ „tradukisto“ uzi la vorton „esperantisto“? A. Grigorov skribas: „Hodiaŭ vespere en la esperantista klubo estos konferenco“. Ĉu ne estos pli bone „okazos“ anstataŭ „estos“? „Post la konferenco estos“ (anstataŭ „okazos“) organiza kunveno“. „Morgaŭ matene estos (anstataŭ okazos) ekskurso...“ „La ekskurson faros (anstataŭ organizos) la Sofia societo de la esperantistoj“ (anstataŭ „Sofia Esperantista Societo“).

Sur paĝo 22-a A. Grigorov skribas: „Kion vi donos al la murgazeto?“ Al la murgazeto oni ne povas doni kion ajn, sed oni kontribuas.

Sur paĝo 27-a A. Grigorov skribas: „Lin tre interesis socialaj problemoj kaj speciale la problemo de (eventuale anstataŭ „pri“) internacia lingvo“. La dekkvina de aprilo (la daton kiam mortis Zamenhof)“. Ĉiu eĉ plej ordinara esperantisto scias, ke Zamenhof mortis ne la dekkvina de aprilo, sed la dekkvaran, la dekkvina de decembro li naskiĝis.

Sur paĝo 28-a A. Grigorov skribas: „K-do Iliev respondis je (anstataŭ „al“) ĉiu demando“.

Sur paĝo 29-a A. Grigorov skribas: „Londono estas nun la plej granda urbo en la tuta mondo. Ĝi estas granda urbego (ok milionojn da homoj ĝi havas)“. En la „Granda Sovetia Enciklopedio“ volumoj 25 kaj 30 estas skribite, ke en 1951 Londono havis 8 346 000 loĝantojn kaj Novjorko en 1950 — 14 800 000. Do, ne Londono estas la plej granda urbo en la mondo, sed — Novjorko.

Sur paĝo 30-a A. Grigorov skribas: „Jen estas la nova numero de nia Esperanto-gazeto „Nuntempa Bulgario“. En ĝi estas skribite, ke „la nacia esperantista kongreso okazos en Sevlievo. La kongreson vizitos ducent kvindek kongresanoj“. Ĉiuj scias, ke en Sevlievo okazis la 25-a landa Esperanto-kongreso en 1939 kaj „Nuntempa Bulgario“ komencis aperi en 1957. Do, ĉu ne estas granda anakronismo? Krom tio ĉu eventuale ne estus pli bone doni informon pri kongreso post la Dua mondmilito, ekz. en Varna (1958) kun 1400

partoprenintoj, en Târnovo (1960) kun 1500 partoprenintoj (sed ne 250 partoprenintoj!)?

Sur paĝo 31-a A. Grigorov uzas la vorton „pensas“ anstataŭ „opinias“. „Mi estas delegito de (anstataŭ „por“) la kongreso el Sofio“.

Sur paĝo 35-a A. Grigorov skribas, ke „La universala kongreso de la esperantistoj, kiu estis (anstataŭ „okazis“) en Varsovio, havis mil cent tri kongresanojn“. Sed kiu kongreso, la aŭtoro ne skribas. Oni scias, ke en Varsovio okazis la 29-a universala kongreso en 1937 kun 1120 kongresanoj. La 44-a universala (jubilea) kongreso okazis en Varsovio en 1959 kun 3400 kongresanoj. Pro kio ni devas doni malverajn, informojn, kaj ne nur malverajn, sed sufiĉe malnovajn?

Sur paĝo 35-a A. Grigorov skribas: „Adreso de la Studenta klubo: strato (anstataŭ „bulvardo“) Evlogi Georgiev“. Neniu scias nun, ke sur str. Evlogi Georgiev troviĝas studenta klubo (eble la aŭtoro volas diri pri bulv. F. I. Tolbuhin aŭ pri bulvardo Ruski?).

Sur paĝoj 36-a kaj 37-a A. Grigorov skribas: „Ŝi entuziasmiĝis de la bela (de kio „bela“ la aŭtoro ne skribas, eble li volas diri „ideo“) de la esperantistoj“. „Ŝi pensis“ (anstataŭ „opiniis“). „Ŝi estis dum longaj (anstataŭ „multaj“) jaroj sekretarino“. „Ŝi donis (anstataŭ „donacis“ aŭ „testamentis“) al ĝi 100 000 levojn“.

Sur paĝo 39-a A. Grigorov skribas „nia klubo pliviviĝas“. Ĉu ne devas esti „plivigliĝis“? „La redakcio de nia murgazeto Str. Aksakov 18 — etaĝo 1“. Sed se laŭ tiu adreso oni serĉos la redakcion, oni trovos nenion.

Sur paĝo 41-a A. Grigorov skribas: „Kun (eventuale anstataŭ „per“) la helpo de niaj korespondantoj la svedaj samideanoj povos publikigi interesajn leterojn pri la bulgara vivo en iuj svedaj gazetoj — ĉiutagaj, ĉiusemajnaj kaj ĉiumonataj“ (anstataŭ „en iuj svedaj gazetoj — ĉiutagaj, ĉiusemajnaj kaj ĉiumonataj“).

Sur paĝo 44-a A. Grigorov skribas: „La hodiaŭa prezidanto de la ĉeĥoslovaka respubliko estas Antonin Zapotocky“. Sed la aŭtoro devas scii, ke Zapotocky mortis en 1957 kaj de tiam prezidanto de la Ĉeĥoslovaka Socialisma respubliko estas Antonin Novotny.

La materialo pri Tomáš Garrigue (ne Garigue) Masaryk estas sufiĉe malnoviĝinta kaj neaktuala. Masaryk mortis en 1937 (ne en 1957). La aŭtoro devas scii, ke nun la oficiala (partia kaj ŝtata) rilato al Masaryk en la Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko (ne Ĉeĥoslovaka respubliko), kiel skribas la aŭtoro, ne estas pozitiva. Tiu ĉu laŭdado en la lernolibro estas ne nur nerekomendinda, sed eĉ reakcia! Sur paĝo 42-a A. Grigorov skribas: „Masaryk estas nia nacia heroo. Li unuigis la ĉeĥoslo-

vakan popolon je (pro kio ne „en“?) batalo por nacia liberigo kaj por demokratio“.

Sur paĝo 45-a A. Grigorov skribas: „Gorna Ĝumaja“. Urbo kun tia nomo nun ne ekzistas en nia lando. La urbo estas nomata Blagoevgrad.

Sur 49-a A. Grigorov skribas: „Kun (anstataŭ „per“) siaj interesaj esperantistaj materialoj, literaturaĵoj, ilustraĵoj „Internacia Kulturo“ trovis la simpatian de la tutmonda demokrata esperantistaro. Ĉiu amiko de Esperanto trovu kaj legu „Internacian Kulturon“. Sed la aŭtoro bone scias, ke nun „Internacia Kulturo“ ne aperas. Kie oni povas ĝin serĉi kaj trovi? Ĉu la aŭtoro ne devis skribi la revuon, kiu nun aperas — „Nuntempa Bulgario“?

Sur paĝo 52-a A. Grigorov skribas: „La aktoroj montrados (ĉu ne estus pli bone „prezentos aŭ „interpretos“?). Okazis katastrofo kun (anstataŭ „je“) la lokomotivo“.

Sur paĝo 55-a A. Grigorov skribas: „Per viva (anstataŭ „vigla“) internacia korespondado“. „Diversnaciaĵoj jam montras sian simpatian por (anstataŭ eventuale „al“) Esperanto“ Aliaj naive pensas (anstataŭ „opiniis“).

Sur paĝo 56-a A. Grigorov skribas: „Ĝi (radioaparato) laboras“ anstataŭ funkcias. „Rigardinte“ (anstataŭ „esplorinte“, „observinte“).

Sur paĝo 58-a: „La prezidanto kun tre serioza vizaĝo (anstataŭ „mieno“).

Sur paĝo 59-a A. Grigorov skribas, ke „la sufikso ind signifas „dostápen“ (anstataŭ „dostoen“).

Sur paĝo 64-a A. Grigorov skribas: „Kiu konatigas nin kun (anstataŭ „pri“) la kultura kaj ekonomia vivo de Aŭstralio“. „Skriba interparolado“ (anstataŭ „konversacio“ aŭ „korespondado“). „Pro (anstataŭ „pri“) tio“.

Konklude ni devas substreki, ke verkado de bona, modela lernolibro ne estas facila afero. Ni sufiĉe klare montris kaj ĉiu facile povas konvinkiĝi, ke la aŭtoro de bona lernolibro devas doni korektajn, modelajn frazojn, verajn kaj kontrolitajn informojn kaj faktojn. Eraroj kaj nekorektaĵoj ne estos allasataj, se en la verkado partoprenas ne unu, sed kelkaj spertaj esperantistoj. La lernolibro de A. Grigorov ne havas redaktoron. Do, la aŭtoro mem redaktis sian lernolibron. Ja, en la Bulgara-esperanta vortaro de la sama aŭtoro, eldonita en 1946 de eldonejo „Narodna Kultura“ ni legas, ke li mem estas redaktoro de sia vortaro. En la Esperanto-bulgara vortaro de la sama aŭtoro, eldonita en 1956 de l'ŝtata eldonejo „Nauka i izkustvo“ ne estas notita redaktoro. Ĉu ne estas klare kaj ĉu la aŭtoro mem ne konvinkiĝis, ke ne plu devas aperadi liaj libroj sen revizilo de redaktoroj? Kaj ĉu la eldonejoj devas eldoni plu similaĵajn librojn sen kompetenta redaktorado?

Iv. Sarafov



KOLEKTO DE RAKONTOJ

## BULGARA PROZO

**Eldono de la Ŝtata Fremdlingva Eldonejo**

Redaktoro Asen Grigorov

Formato 14,5×21 cm, tole bindita, aparta ŝirmkovrilo,  
luksa papero.

**Prezo 10,50 levoj**

Liveras BULGARA ESPERANTISTA KOOPERATIVO,  
bulv. Stalin 40, Sofia. La libro estas trovebla ankaŭ ĉe  
la ŝtataj librejoj en la pli grandaj urboj de la lando.

---

La plej konvena donaco

por via eksterlanda korespondanto estas

## ELEKTITAJ VERSAĴOJ

de NIKOLA VAPCAROV

kun antaŭparolo de ĤRISTO RADEVSKI  
sub la redakto de ATANAS LAKOV

Luksa papero, broŝurita, paĝoj 72

Aĉetebla ĉe la librejoj de la Bulg. Esp. Kooperativo  
en Sofio kaj ĉe la librejoj de „Peĉatni proizvedenija“ en la  
pli grandaj urboj de la lando

Prezo 6,70 lv.

